

24a ORDINARA DIMANĈO – 11a de septembro 2016

Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

## **EN LA ĈIELO ESTOS PLI DA ĜOJO PRO UNU PEKULO, KIU KONVERTIĜAS, OL PRO NAŬDEK NAŬ JUSTULUJ, KIUJ NE BEZONAS KONVERTO**

*El evangelio laŭ Luko 15, 1-32*

En tiu tempo tempo impostistoj kaj malbonfamaj homoj alproksimiĝis al Jesuo por aŭskulti Lin. Sed fariseoj kaj leĝinstruistoj murmuris, dirante: «Li favore akceptas malbonulojn kaj manĝas kun ili». Tiam Li diris al ili la jenan parabolon:

«Se iu el vi havas cent ŝafojn kaj perdas unu el ili, kion li faras? Li lasas la naŭdek naŭ sur la stepo, kaj iras serĉi la perditan, ĝis li retrovos ĝin. Kaj kiam li trovis ĝin, li metas ĝin ĝoje sur siajn ŝultrojn. Kaj reveninte al sia domo, li kunvokas amikojn kaj najbarojn kaj diras al ili: “Ĝoju kun mi, ĉar mi retrovis mian ŝafon, kiu perdiĝis”. Mi certigas vin, ke en la ĉielo estos pli da ĝojo pro unu pekulo, kiu konvertiĝas, ol pro naŭdek naŭ justuloj, kiuj ne bezonas konverton.

Se iu virino havas dek draĥmojn kaj perdis unu el ili; kion ŝi faras? Ŝi ekbruligas lampon, balaas zorge la domon kaj serĉas diligente sian moneron ĝis ŝi trovos ĝin. Kaj trovinte, ŝi alvokas amikinojn kaj najbarinojn, kaj diras al ili: “Ĝoju kun mi, ĉar mi retrovis la draĥmon, kiun mi perdis”. Tiel same, Mi diras al vi, ankaŭ la anĝeloj de Dio faras grandan feston pro unu pekulo, kiu konvertiĝas».

Jesuo diris ankaŭ ĉi tiun parabolon: «Iu viro havis du filojn. La pli juna diris al la patro: “Patro, donu tuj al mi la heredotan parton”.

**Tiam la patro dividis inter ili siajn havaĵojn. Post ne multaj tagoj la pli juna filo vendis ĉion, kaj kun la akirita mono forvojaĝis al malproksima lando. Tie li perdis sian tutan havon per diboĉa vivado. Sed en tiu lando, kiam li jam elspezis ĉion, okazis granda malsato; kaj baldaŭ la junulo troviĝis meze de gravaj malfacilaĵoj. Tiam li iris al unu el la loĝantoj de tiu lando kaj proponis al li sian servadon. Tiu sendis lin sur siajn kampojn gardi porkojn. La junulo estis tiel malsata, ke li volus plenigi sian ventron per la karoboj, kiujn la porkoj manĝis, sed neniu donis ilin al li. Tiam li pripensis sian situacion, kaj diris: "La taglaboristoj de mia patro havas nutraĵojn abunde, dum mi ĉi tie pereas de malsato! Mi reiros al mia patro, kaj mi diros al li: Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj kontraŭ vi; mi ne plu meritas esti via filo; traktu min kiel unu el viaj taglaboristoj!". Li tuj leviĝis kaj reiris al sia patro.**

**Li estis ankoraŭ malproksime de la patra domo, kiam lia patro lin vidis, kaj kortuŝite kuris renkonte al li. Li brakumis la filon kaj lin kisadis. Tiam la filo diris: "Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj kontraŭ vi. Mi ne plu meritas esti rigardata kiel via filo". Sed la patro ordonis tuj al siaj servistoj: "Rapidu: alportu la plej belan robon kaj lin vestu. Metu ringon sur lian fingron kaj sandalojn sur liajn piedojn. Poste prenu la bovidon, kiun ni grasigis, kaj buĉu ĝin. Ni devas havi festenon pro lia reveno: ĉar ĉi tiu mia filo estis por mi mortinta, kaj nun li denove revenis al vivo; li estis perdita, kaj mi denove retrovis lin". Kaj ili komencis festi.**

**La pli aĝa filo estis sur la kampo; je sia reveno, kiam li alproksimiĝis al la domo, li aŭdis muzikon kaj dancadon. Tiam li alvokis unu el la servistoj, kaj demandis lin, kio okazas. La servisto diris: "Via frato revenis, kaj via patro buĉis la bovidon, kiun ni grasigis, ĉar li rericevis sian filon viva kaj sana". Sed la pli aĝa frato montriĝis ofendita kaj eĉ ne volis eniri. Tiam lia patro elvenis, kaj klopodis konvinki lin eniri. Sed la pli aĝa filo diris al li: De tiom da jaroj mi servas al vi kaj neniam mi malobeis vian ordonon. Tamen vi neniam donis al mi kapridon, por ke mi festenu kun miaj amikoj. Sed nun revenis ĉi tiu via filo, kiu fordiboĉis vian havon kun malĉastulinoj, kaj por li vi buĉis la grasigitan bovidon!". La patro respondis: "Filo, vi estas ĉiam kun mi, kaj ĉio mia estas ankaŭ via. Mi ne povis ne esti feliĉa kaj festi, ĉar ĉi tiu via frato estis por mi**

**mortinta kaj nun revenis al la vivo; li estis perdita, kaj nun mi retrovis lin!“».**

Dum leĝinstruistoj kaj fariseoj pretendis, konduki la popolon al Dio, kaj tion pere de obeo al piaj reguloj kaj religiaj preceptoj, Jesuo elektas tute alian vojon: li ne volas konduki la homojn al Dio, ĉar li scias, ke, se oni volas konduki la homojn al Dio, neeviteble iu postrestas kaj ne atingas la celon; Jesuo, male, volas konduki Dion al la homoj, kaj la vojo estas nur unu: komuniki lian mizerikordon kaj lian kompaton.

Oni povus konjekti, ke ĝuste la leĝinstruistoj kaj la fariseoj, tiel piaj kaj religiemaj, akceptas la elekton de Jesuo kaj kunlaboras. Sed ili ĝin malaprobas. Ni legu la hodiaŭan ĉapitron de Luko ekde la unua versiklo.

*“impostistoj kaj malbonfamaj homoj alproksimiĝis al Jesuo”... “...por aŭskulti Lin.”.* Estis tiu la feĉo de la socio, la forpelitoj de la religio, la apartigitoj, kiuj tamen perceptis en la mesaĝo de Jesuo respondon al sia aspiro al vivopleno: aspiro, kiun ĉiu persono retenas en si mem.

Persono ja povas travivi sian ekziston misdirektite, trempite en pekojn, malesperon kaj suferon; sed tiu aspiro neniam estingiĝis. Kaj ĝi perceptas en Jesuo la respondon al sia postulo.

*Tiam Li diris al ili la jenan parabolon.* La parabolo ne estas por la disĉiploj, sed por la fariseoj kaj la leĝinstruistoj, do siaj malamikoj.

*Se iu el vi havas cent ŝafojn kaj perdas unu el ili, kion li faras? Li lasas la naŭdek naŭ sur la stepo, kaj iras serĉi la perditan, ĝis li retrovos ĝin”.* Fakte la parabolo konsistas en tri partoj. En la unuaj oni parolas pri la ĝojo de Dio; en la tria, konata kiel tiu pri la diboĉa filo, pri la kialo de tiu ĝojo. En la unua Jesuo asertas, ke la paŝtisto lasus 99 ŝafojn je dispono de rabistoj kaj sovaĝaj bestoj, por serĉi unu perditan; neniu prudenta persono tion farus, sed Jesuo sekvas alian logikon, tiun por la bono de la homo. Prudenta persono, trovinte la ŝafon (kaj tio estus ja mirakla evento), ĝin reportus en la gregejon per piedfrapoj kaj riproĉoj, kaj ĝin ŝlosus tie. Sed Jesuo prezentas sin kiel la bonan ŝafiston, kaj la perdiĝintan ŝafon kiel pekinton. Kaj *kiam li trovis ĝin, li metas ĝin ĝoje sur siajn ŝultrojn*, kaj la rilato kun la paŝtisto estos pli strikta ol tiu de la aliaj 99, ĉar okazis interŝanĝo de forto

kaj de ĝojo *"li kunvokas amikojn kaj najbarojn kaj diras al ili: "Ĝoju kun mi, ĉar mi retrovis mian ŝafon, kiu perdiĝis"*.

Je la fino de la tria parabolo aperas la pliaĝa filo: li estas la piulo, kiu ĉiam servis kaj obeis sian patron, sed dum sia tuta vivo neniam komprenis la koron de sia patro, kaj *eĉ ne volis eniri*": la juĝo pri ĉio per rigidaj religiaj principoj riskas forigi la ĝojon. Ĉu la leĝinstruistoj kaj la fariseoj tion komprenis?